

Syllas



8-6-1974

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRÁSÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 242-5211

70.000 – Brasília (DF)


CGC Nº
00406 504/1000-06

NOVEMBRO DE 1979

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 50

Redação: MARIA ALMADA



D-ro L. L. ZAMENHOF


Kreinto de la lingvo internacia.
(15 - 12 - 1859 – 14 - 04 - 1917)

La 15-a de decembro estas festo internacia, ĉar la tuta esperantistaro memoras pri nia Majstro.

Li semis en nian intelekton la ideon pri internacieco, frateco kaj amikeco.

Nia eksterordinara Majstro antaŭ cent jaroj jam sciis, ke la homaro bezonas iun internacian komunikilon kaj kreis Esperanton.

Neniam ni forgesu lin!



FRANCISCO DE
SOUZA ALMADA
Unua prezidanto de
Brazila Konsilantaro
de Esperanto.



ELVIRA FONTES

Vicprezidantino
(ekzekutiva) de
BKE
kaj prezidantino de
APE.



Sur la foto estas: s-ano Nelson Pereira de Souza, ĝenerala sekretario kaj s-ano Augusto S. da Cunha, financa direktoro de BKE; membroj de LKK por la 66-a UK, en plena aktiveco.

KRISTNASKOFESTOJ

Alproksimiĝas la bela Kristnasko. La direktoraro de Brazila Konsilantaro de Esperanto Deziras informi siajn kunlaborantojn kaj helpantojn, ke, kiel ĝi prosis, laŭeble pli bone, plenumas sian

taskon, dankante al ĉiuj la fidon, la amikecon kaj la helpon. Por la plej bela festo-tageto de ĉiuj kristanoj, Kristnaskofesto, deziras feliĉon, sanon, pacon kaj prosperan Novjaron!

ESPERANTO EN BRAZILLO

Laŭ la notoj de la neforgesebla s-ano Iŝmael Gomes Braga, Esperanto aperis en Brazilo, en la jaro 1894-a. En tiu jaro enmigris Brazilon la juna ĉeĥo Francisko Waldomiro Lorenz, unu el la rektaj kunlaborantoj de D-ro Zamenhof. Li kunportis la "semon" al Brazilo, de la idealo de nia Majstro. F. V. Lorenz loĝis kaj laboris en la ŝtato Rio Grande do Sul, ĝis sia morto.

La disvastigado de Esperanto en Brazilo tro lante evoluis. Ĝin lernis nur kelkaj kleraj homoj, inter kiuj troviĝis Iŝmael Gomes Braga. La junan Gomes Braga allogis la ideo pri internacia komunikado kaj li klopodis propagandi, instrui kaj konvinkigi la brazilanojn pri la praktika utileco de la internacia komunikilo. Kelkaj ellernis ĝin iomete, sed paroli ĝin neniu kapablis. Ne ekzistis lernolibroj, propagandiloj kaj ĉa plej grava manko estis la ne intereso pri la idiomo.

Laŭ la "Veterano" de Ismael Gomes Braga, paĝo 132, "vigla Esperanto-movado komenciĝis en la 7-a de marto 1906, kiam oni fondis la unuan Esperanto-societon en Brazilo, la grupon "Suda Stelaro", en Campinas; la 29-an de junio 1906 fondiĝis, en Rio de Janeiro, Brazila Klubo Esperanto; en aprilo 1907 aperis la unua gazeto "Brazila Revuo Esperantista", kiu en septembro, 1908, ŝanĝis sian nomon je "Brazila Esperantisto"; en la 13-a de julio, 1907 kunvenis la unua tutlanda kongreso de esperantistoj kaj fondis Brazilan Esperanto-Ligon". La gazetoj neregule aperadis. Sekve pro manko de komunikiloj aliaj bultenoj aperadis en diversaj partoj de la lando, kiuj ne apartenis al BEL.

Tiutempe agadis nur unuopuloj tra la vasta lando, sen ia ajn organizado. La movado travivis diversajn malfacilajn fazojn. Plurfoje ŝajnis malaperi definitive, sed

ekzistis kelkaj ĝisostaj esperantistoj, kiuj ne permesis, laborinte senespere kaj fortostreĉe. Mankis lernolibroj, propagandiloj, legolibroj kaj intereso pri la movado.

Por eldoni librojn kaj diversajn esperantajojn, estis fondita en 1951 la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, ankaŭ en Rio de Janeiro. Tiu fakto vekigis plurajn miskomprenojn en la movado.

Ĝis la jaro 1973-a BEL estis la oficiala reprezentanto de UEA en Brazilo, sed post la forpaso de s-ano Iŝmael Gomes Braga nia movado troege malfortiĝis.

Ĉar la anaro estis disigita, s-ano Lazarus Brieger, havis la ideon proponi al UEA, ke ĝi akceptu KKE'n kiel ĝian duan oficialan peranton. Dank' al la persona influo de s-ano Brieger ĉe UEA, en Beogrado, Jugoslavio, dum la 58-a UK, en la jaro 1973-a, KKE iĝis dua reprezentanto en Brazilo, pro kio BEL rezignis la peradon de UEA.

La anaro esperis, ke la movadon iu reorganizu, ke aperu regule gazeto, ke la agado de la gvidantoj estu firma, sed vane. Okazis nenio nova.

Tiam la Esperanto-Movado en Brazilo entute stagnis.

Kelkaj progresemaj esperantistoj proponis al la nova reprezentanto de UEA organizi grupojn memstarajn en pluraj ŝtatoj kaj tial vigligi la intereson por Esperanto, sed tiu ideo ne estis aprobita.

S-ano Onésimo Farias, prezidanto de la "Instituto Esperanto de Educação", de Belo Horizonte (MG), proponis tiam fondi novan societon, kies sidejo estus en Braziljo (FD), kaj kunvokis la anaron por pritrakti la farendajn paŝojn. La unuan renkontiĝon en la ĉefurbo partoprenis ok personoj la 20-an de januaro, en 1974. Ĉar la nombro de la partoprenintoj estis malalta nenio estis decidita. En la monato majo, en la sama jaro, okazis la dua kun-

veno, rilate la aferon, sed en San-Paŭlo (SP), kiun ĉestis ĉirkaŭ 50 personoj. Estis invitita la reprezentanto de UEA, sed li ne aperis. La debato daŭris du tagojn, sed sen pozitiva rezultato kaj estis fiksita alia dato por iu nova kunveno, la 8-an de junio 1974, en Belo Horizonte (MG).

En la ejo de la "Instituto Esperanto de Educação" kunvenis la anaro kune kun 8 reprezentantoj de societoj el diversaj ŝtatoj kaj urboj kaj estis fondita la Brazilia Konsilantaro de Esperanto.

Estis lanĉita la sorto de la Esperanto-Movado en Brazilo; komenciĝis nova fazo en la esperanta vivo de nia lando.

La estraro de la nova organizaĵo: prezidanto Francisco de Souza Almada, vicprezidanto ekzekutiva F-ino Elvira Fontes, ĝenerala sekretario Nelson Pereira de Souza, kaj financa direktoro, Carlos Augusto Siqueira da Cunha.

La oficiala komunikilo de la novbakiĝinta societo estas ĝia monata Informa Bulteno, sub la redaktado de S-ino Maria Almada. La eta grupo eklaboris senmone, sen iu ajn kunlaborado, sed ne mankis elementoj, kiuj sin preparis por mortbati la organizon en la nomo de ajna "Sankta Tradicio". Dornpika estis la vojo de la BKE-adeptoj. Pluraj el ili nin priridis, aliaj malfidis, nur la veraj geamikoj de la prezidanto F. S. Almada pretis helpi en la unua momento la novan organizaĵon.

BKE ĉiam pacience kaj korekte agadis kaj agadas. La Bulteno regule aperadas kaj estas dissendata senpage al ĉirkaŭ 800 personoj, kaj kelkaj al eksterlando. Helpas kiu volas kaj kiu povas. La kunlaborantoj de BKE neniam reagis je pikoj de venenitaj sagoj, kiuj ĝin atingis. Iu, en al ni direktita letero skribis: "ni jam havas du senkapajn organizaĵojn landajn, ĉu BKE estos la tria?"

La demando havis sian kialon. La ĝistiamaj gvidantoj agadis malforte kaj la anaro fidis je neniŭ. La respondo al tiuj skeptikuloj estas nia serioza por esperanta agado.

Dum tiu kvinjara ekzisto de BKE la situacio multe ŝanĝiĝis. En la jaro 1976-a

estis elektita nova ĉefdelegito por Brazilo, s-ano Inĝeniero Giuseppe Grattapaglia, kiu plene apogas nin.

La prezidanto de BKE kontaktis plurfoje la Ministerion por Edukado kaj Kulturo, diversajn deputitojn federaciajn, kiuj apogas Esperanton, kaj en 1978 BKE okazigis la unuan Latin-Amerikan Kongreson en Marilja (SP), subvenciita de MEC, kun sukceso. Reprezentantoj el Argentino, Peruo, Venezuelo, Meksikio, Ĉilio kaj aliaj landoj ĝin partoprenis.

La nombro de la societoj, kiuj konsistigas BKE'n, estas 28. Tio signifas, ke la anaro nuntempe fidas je la direktoraro de nia organizaĵo, pro tio multaj personoj helpas al ni aĉeti propran sidejon en Brazilja. La nun aĉetita sidejo apartenas al Brazilia Konsilantaro de Esperanto, sed al ĝi ĉiuj estas bonvenontaj.

La unua kongreso de BKE estas programita por Juiz de Fora (MG), ĝi okazos de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo 1980, dum la Sankta Semajno.

Tiu kongreso celas disvastigi la internacian idiomon inter la studentojn de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, kaj por kroni la laboron de la organizaĵo, okazos la 66-a Universala Kongreso de Esperanto en Brazilja (FD) en la jaro 1981-a. Parto de la direktoraro de BKE apartenas al LKK, kaj nia sidejo estos la akceptejo de la kongresa komisiono dum la preparado de la evento. Pere de tiu okazintaĵo realiĝos la deziro de nia prezidento F. S. Almada, kiu jam antaŭ 12 jaroj klopodis konvinki BEL okazigi UK'on en Brazilo, sed sen sukceso.

Pri la rekono de la valoro de BKE atestas la malavara monhelpo de la samideanaro. Dank'al tio ni povas eldoni nian Informan Bultenon regule kaj aĉeti la kulturan centron en nia ĉefurbo, post kvinjara batalado, kio malofte okazas en la Esperanto-Movado.

BKE ankaŭ eldonis lernolibron malmultkoston por helpi la instruadon de la lingvo kaj ĝin popularigi en Brazilo.

La kunlaborado kaj helpo de nia anaro estas al ni la plej grava rekompenco.

Dankon!

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni dankas la monhelpon de la jenaj:

Hersila Valverde	200,00
Lanoy Dorin	200,00
Claudio Zimmermann	100,00
F.S. Almada (libroj venditaj) . . .	500,00



ESPERANTO EN PRAKTIKA UTILECO

Kelkaj komercistoj utiligas la nomon "Esperanto" por siaj butikoj: "Relojoaria Esperanto", en Governador Valadares, "Ótica Esperanto", en Volta Redonda, "Armazém Esperanto" en Lavras (MG), kaj "Clínica Esperanto", en Belo Horizonte (MG).

TRA BRAZILIO

Fortaleza (CE) - Prof-ro Paulo Amorim Cardoso eldonis libron por propagandi pri la internacia lingvo: "Destruindo a Torre de Babel". Li gvidas konstante korespondan kurson. La tuta kurso kostas Cr\$ 280,00. Lia Adreso: "Curso de Esperanto da Universidade Federal do Ceará" Caixa Postal Nº 1221 — CEP 60.000 Fortaleza (CE).

Recife (PE) - La esperantistaro de tiu ĉarma urbo estas gratulinda. Ili havas konstantajn kursojn, havas libroservon, organizas interfratigajn verpermenĝojn kaj eldonas monatan informilon. Laŭdinda estas la agado de la pernambukanoj.

Salvador (BA) - S-ano José Saraiva Matos, nia vicprezidanto, kaj unu el la fondintoj de BKE, nuntempe sukcesis aperigi en la loka gazeto "Esporte Jornal" kurson pri Esperanto, publikante la lecionojn. Bona maniero voki la atenton de la neesperantistoj, dank'al S-ro D-ro Luiz Eugenio Tarquinio, direktoro de la gazeto. Gratulon!

Ilhéus (BA) - S-ano Eleus Leonardo de Sá post la reveno el Eŭropo, kie li partoprenis la 64-an U.K! on en Lucerno (Svisio), ekagis. Li klopodas elkovri la certan nombron de lá esperantistaro en la ŝtato Bahia.

Omaĝe al la profesoroj li skribis: "Profesoro estas la lumo de la Mondo" - "Estimataj profesorinoj, estimataj profesoroj, mi salutas vin. Hodiaŭ ni kuniĝas por omaĝi, kvankam modeste, tamen gaja, la plej karan tagon al ĉiuj kies tasko estas liveri la lumon al kiu ne vidas pere de la edukado la grandeco de la kulturo. Al ĉiuj kiuj instruas. Hodiaŭ mi omaĝas la tagon de la profesoro.

Kvazaŭ anĝelo kiu gvidas nin, la profesoro gvidas la tutan socion, protektante ĝiajn membrojn. Ne ekzistus ĝusta socio se ne ekzistus la instruisto. Pro tio ni kuraĝas agnoski tiun veron: Kiom pli klera estu la instruisto, des pli bona estos la socio. Antaŭen ĝeinstruistoj, la lumo de la mondo estas vi!"

Brazilja (FD) - La gazeto "Correio Brasiliense", el nia ĉefurbo, publikis artikolon pri la aĉeto de la propra sidejo de Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Caçapava (SP) - Estas bonega la pagando pri la 1-a Kongreso de BKE, kiun nia vicprezidanto Gilberto Silva Velho faras sur diversaj gazetoj. Pro lia helpo ni jam multe skribis, sed li estas unuaklasa esperantisto kaj homa persono. Malgraŭ lia alta posteno, Majoro, li klare batalas kontraŭ la nuna kontraŭhoma agado politika.

Li diras:

"A infernal Potestade
que invadiu toda a terra,
foi que trouxe a maldade
de homens fazerem guerra.

San-Paŭlo (SP) - Kun malĝoja koro ni sciigas la forpason de nia kara amikino kaj amideanino Guiomar A. de Aquino, kun kiu ni partoprenis la 64-an UK en Lucerno.

Ŝi la 11-an de oktobro definitive forvojaĝis al eterneco kaj postlasis al ni saŭdadon!

S-ino Guiomar multe helpis la movadon en nia lando kaj jam de longe ŝi estis delegito de UEA por katolikismo.

Santos (SP) - Realizou-se a 5 de setembro último o casamento da senhorita Regina Myriam e Carlos Roberto, ela filha dos gesamideanoj Seraphim Guedes e Esther Simões Guedes, e ele filho do casal Francisco José Tavares e Laurentina Lourenço Tavares.

Ao jovem casal desejamos toda sorte de felicidade.

Sorocaba (SP) - Agradecemos ao S-ano Eluizio B. Rodrigues, digno presidente do Sorocaba Esperanto Klubo, a mensagem alusiva à compra de nossa sede vasada nos seguintes termos: "Tem esta a finalidade de parabenizá-lo e a toda diretoria do Conselho Brasileiro de Esperanto, por terem adquirido em Brasília, na zona bancária, sua sede própria. É um trabalho digno de ser imitado por todas as entidades esperantistas.

Porto Alegre (RS) -Elkoran dankon al D-ro Ivo Sanguinetti, nia kunlaboranto kaj redaktoro de la novaperinta "Suda Stelo", pro la propagando pri la lernolibro "Esperanto Elementar".

Estas tre grave por ni vendi la libron ĉar la eldonkosto de nia Bulteno altiĝis kaj ni bezonas urĝan menhelpon. La vendado de nia "Esperanto Elementar" multe helpas la eldonon de nia informilo. Eĉ per poŝtmarkoj oni povas ankaŭ helpi, kion ni kore antaŭdankas.

Rio Grande (RS) - En la gazeto Rio Grande s-ano Manoel Torres de Abreu aperigis bonegan artikolon kontraŭ la perforta agado de la homaro huntempa. Similaj artikoloj estas tre aktualaj, ĉar eĉ kelkaj esperanto-gazetoj aperigas artikolojn pri terorismo.

Ni kredas, ke pro tiaj "esperantistoj", Zamenhof en la alia mondo hontas. D-ro Abreu diras prave: "Haja mais fraternidade, não haverá mais a violência".

Li tute certas: "estu ni pacaj batalantoj!"

S. Sebastião do Caf (RS) - S-ano Oto Vaske dissendadas propagandilojn pri la Esperanto-movado kaj pri la utileco de la lingvo. Dank' al li la libro "Esperanto Elementar" vendiĝas pli ofte lastatempе. Temas pri eldonaĵo de BKE, kiu helpas la aperigon de nia Bulteno. Lia agmaniero ankaŭ helpas la diskonigadon de Esperanto kaj rekruti novajn elementojn por la movado.

Ni sentime asertas, ke Rio Grande do Sul estas unu el la plej kleraj ŝtatoj de Brazilo. BKE multe ŝuldas al tiu helpema ŝtato.

- x - x - x - x - x - x -

LA FAMO

Foje la mondkonata artisto Ĉarles Ĉaplin renkontiĝis kun la sciencisto Albert Ajnštajn. La granda scientisto diris al la granda artisto:

- Vi estas fama artisto, la tuta mondo komprenas vin; en via arto mi la plej taksas la internaciecon.

- Tio estas vero, diris Ĉaplin, sed mi opinias, ke vi estas pli fama, ĉar la tuta mondo vin admiras, sed neniu vin komprenas.

IN MEMORIAM ...

Faz exatamente um ano que o nosso amigo NID DUTRA DE AMORIM deixou este mundo. Dois dias antes de partir escreveu a seguinte mensagem que publicamos, lembrando-o com saudade:

"Creio firmemente em Deus e em sua Sabedoria Cósmica.

O meu caminho me é revelado pela Sabedoria Cósmica de Deus.

Vivo na alegre expectativa de conseguir sempre o que há de melhor e coisas maravilhosas e imprevistas ocorrem diariamente em minha vida.

O efeito curador do amor de Deus existente em meu subconsciente, afasta de mim todas as doenças e faz com que todas as células, glândulas e órgãos do meu corpo, trabalhem na mais perfeita harmonia, mantendo-me a saúde perfeita e um vigoroso poder mental.

Louvado seja Deus.

O Poder Cósmico de Deus flui levemente através do meu ser sob a forma de saúde, paz e prosperidade.

Deus abriu a minha mente e libertou os meus talentos.

Sinto estar pondo constantemente em liberdade, idéias novas e criadoras e também libertando todo o esplêndido enclausurado em meu íntimo.

Deus nos criou para uma vida plena feliz e gloriosa.

"Vim para que tenham vida e a tenham em abundância", disse o "Filho do Deus Vivo", nosso mestre Jesus.

A riqueza divina está sempre presente em minha vida. Esta idéia está fixada em meu subconsciente e sei que tudo aquilo que está fixado vem a se verificar.

A minha mente Cósmica é de natureza divina, pois, fui criado à imagem e à semelhança de Deus.

Sou por isto, feliz, bem sucedido e próspero.

O Deus Todo-Poderoso libertou-me de todo tipo de escassez.

Sou um novo ser perfeitamente identificado com Deus.

Vivo agora, na mais completa abundância espiritual, mental e material.

Louvado seja Deus!

O Poder Cósmico de Deus me fortalece de todos os modos possíveis e me dá condições para fazer todas as coisas.

Deus me proporciona uma vida de abundância e me revela as respostas dos meus problemas. Seu amor enche a minha mente e o meu coração.

Deus está comigo e me dá condições para superar qualquer situação. Nasci para vencer, para ser bem sucedido, ser feliz, obter o que necessito, sem interferir com o direito dos outros. Estou em contato com a fonte eterna de todos os suprimentos e sei que a presença de Deus me proporciona paz de espírito, felicidade, alegria, sucesso e prosperidade, fazendo-me

realizar todos os meus desejos.

O Poder Cósmico de Deus me liberta de qualquer vício ou fraqueza. Não há na Mente Cósmica, nem **Tempo**, nem **Espaço**, tudo se resume em um **agora** eterno.

Não há nenhum poder capaz de desafiar o Poder de Deus, o Espírito Vivo e Todo Poderoso e que existe no íntimo de nós mesmos.

"O Reino de Deus está dentro de nós mesmos".

Conservo minha mente em Deus e mantenho-me em paz. Reconheço a presença divina em todas as minhas transações. Sinto-me feliz em saber que Deus mora em meu coração.

Mensagem escrita por
Nid Dutra d'Amorim em 31.12.78

- x - x - x - x - x - x -

La jena poemo estis verkita de la poeto Boris Petrov Kavaljiev honore al nia kara sam-ino Nydia A. Krieger:

AL BRAZILA KONGRESANINO Nº 1211

De distanc' granda transoceana
gvidata de l' sent' samideana
vi venis ĉe ni, brazilanino
ĉarma, ĝentila kongresanino!

Mi vin renkontis tute hazarde
simple surstrate marŝante,
via figuro bele konturis
kaj vi tiel ĝentile kondutis!
Jen, komencis amiĉec' kutima
kun reciproka sento estima
kvazaŭ ekfloris belega floro
kun du radikoj el niaj koroj!

Kelkfoje apude ni eĉ sidis
en lingva amata babilante
agrablan mi ĝuis la kuneston
dum nia tradicia jarfesto!
Kvankam el land' de l' fora kontinent'
per Esperanto ni bone spertis
la varman amikan senton
kiun nia idealo kreis!

Al vi mi volas konfesi
eĉ pli sincere promesi
ke vi restos profunde en koro
plej bona amikino kongresa!
Varna (Bulgario), 05-VIII-1978

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

De nia kara amiko D-ro Humphrey Tonkin ni ricevis leteron informante pri la kotizoj de la Societo Zamenhof por la venonta jaro: Cr\$ 1.000,00. Ĉar temas pri elstara societo, kiu multe helpas la movadon, ni invitas la geamikojn ĝin partopreni.

Dankon al ĉiuj.

- x - x - x - x - x - x -

KOTIZTABELO DE UEA POR 1980

MA - Membro Abonanto (ricevas jarlibron kaj la revuon "Esperanto" 500,00
DM - Dumviva Membro, por la tuta vivo (pagas 25 XMA) 12.500,00
MJ - Membro kun jarlibro 200,00
K-to Abono de "Kontakto" . . . 150,00
SA - Simpla abono de la revuo "Esperanto" sen membreco de UEA-TEJO. 100,00
UN kaj NI-10 numeroj 125,00
AM - Asociaj Membroj fariĝos ano de la Klubo Lidia Zamenhof 100,00
EO - DOK/Esperanto Dokumentoj 10 numeroj 200,00

Oni povas sendi la jarkotizon al ĉefdelgito Giuseppe Grattapaglia laŭ la adreso: Caixa Postal N^o 04-0097 - CEP 70.000 BRASÍLIA (DF) aŭ al Kultura Kooperativo de Esperantistoj - Caixa Postal N^o 1887 CEP 20.000 - RIO DE JANEIRO.

- x - x - x - x - x - x -

RIO DE JANEIRO (RJ)

Kultura Kooperativo de Esperantistoj informas nin, ke ĝi kolektas ankaŭ la kotizojn por la II-a Latin-Amerika Kongreso okazonta en S. Luiz - Argentina.

La kotizoj ĝis la 31-a de decembro 1979 kostas U\$ 30,00; post tiu ĉi dato ĝi kostos U\$ 40,00 ĝis la 31-a de majo 1980; fine poste ĝi kostos U\$ 50,00.

La Kooperativo organizas karavanojn por la veturado kaj la interesatoj devas sin turni al ĝi laŭ la adreso: Cx. Postal N^o 1887 - CEP. 20.000 - Rio de Janeiro (RJ). La prezidanto de KKE: D-ro Braz Cosenza, kiu disponigas la planon por la vojaĝo.

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. - Argentino

"La junuloj estas metataj al ekzerco por militservo". Ni ne forgesu, ke por tia ekzerco ni havas specialan sportdevenan vorton. Tial. . . "ili estas submetataj al "trajnado" por la militservo". - "Foje la kuraĝo decidas en milito" - Prefere . . . "aŭdaco decidas en milito". - "En tiu universitato ekzistas elekto-fakoj. Ni diru "ekzistas nedevegaj aŭ laŭvolaj fakoj". - "Tio okazis en eksterurba vojeto" - Prefere: "Tio okazis en kampa ĉarvojo".

Diversaĵoj

Ĉu la bestoj dormas? - Kiel ili dormas? Certe ne ĉiuj egale. Ekz.: La simioj ne multe diferencas de la homoj tiurilate. - La elefantoj dormas same dum la nokto, sed nur la junaj ekkuaŝas sur la tero. La pli maljunaj restas starantaj kaj preferas meti sian dikan kapon sur la rokoblokon aŭ arbostumpon.

Unu ĉiam restas kiel gardostaranto. - La ĉevaloj staradas dum la dormo, nokte kaj tage. Oni povas vidi ilin en angulo de farmejo kun mallevita kapo. Ankaŭ la fokoj dormas kun mallevita kapo. Unu ĉiam estas veka kiel gardostaranto por eventuala averto pri danĝero. - La rinocero ĝuas grandan komforton: birdeto sidas sur la larĝa dorso de ĉi tiu solulo inter la sovaĝaj bestoj kaj signalas ĉian danĝeron. - Mevoj kaj anasoj dormas sur la akvo; la plej multaj birdoj sidas sur branĉo kaj kaŝas la kapon en la plumojn. - La grandflugilaj murhirundoj (cipseloj) havas strangan dormkutimon. En varmaj someraj noktoj ili leviĝas tre alten kaj tiam lasas sin kun larĝe etenditaj flugiloj ŝvebi en la suprenirantaj aerfluo, kaj dum tio ili dormetas. - Treege dormema estas la ringserpento (natrikso) kiu maldormas nur dum mallonga tempo en la tagmezo. - La vespoj estas tre singardaj. Antaŭ ol ekdormi ili fermas sian neston per terpeceto. La fiŝoj dormas tre malregule. Ĉu ankaŭ la bestoj de la malpli altaj klasoj vere dormas aŭ ne, tion la scienculoj kaj la naturobservantoj ĝis nun ne sukcesis konstati.

- x - x - x - x - x - x -

Ni dankas la ricevon de la jenaj:
Boletim Mensal da APE, Recife, A Can-
deia, Esporte Jornal, Diário de Taubaté,
Correio Brasiliense, Z.E.T., de Jugoslavio,
Correio Fraternal, do A.B.C., Informilo el
Sorocaba, Diário Popular, O NO.SSO, Rio
Grande, Diário da Tarde, Ilhéus Jornal,
Suda Stelo, Budho kaj la Moderna Homo,
el Germanujo, Ekonomía Bulteno pri
Usono, Correio do Povo, O Caminho.

- x - x - x - x - x - x -

LA I-A KONGRESO DE BKE

Brazila Konsilantaro de Esperanto
okazigos sian unuan Kongreson de Espe-
ranto en la bela urbo Juiz de Fora (MG),
de la 3-a ĝis la 6-a de aprilo de 1980-a,
dum la Sankta Semajno. Ĝis la 20-a de
novembro jam aliĝis la jenaj personoj:
1) Delio Pereira de Souza, 2) Arlete P. de
Souza, 3) Jair Pereira Rezende, 4) Gilber-
to A. Silva Velho, 5) F. S. Almada, 6) Ma-
ria Almada, 7) Carlos A. S. Cunha, 8) Nair
S. Cunha, 9) Antonio de Freitas Leal.

Prof-ro Amarilio H. Carvalho, vicpre-
zidanto de BKE, prizorgas la abonon de
Heroldo de Esperanto en nia lando.

La abonkotizo ĝis la 31-a de marto,
1980, estas: marvoje sendita Cr\$ 300,00
kaj aerovoje Cr\$ 450,00. Ankaŭ KKE-
Kultura Kooperativo de Esperantistoj,
ricevas kotizojn por la sama preiodaĵo.

Informas nin ankoraŭ Prof-ro Amari-
lio, ke li konstante deĵoras ĉe Brazila
Esperanto-Ligo, Praça da República, 54
2º - CEP. 20.211 - Rio de Janeiro (RJ).

BEL kiel dua peranto de UEA ankaŭ
ricevas la jarkotizojn de UEA por la ve-
nonta jaro 1980-a.

Nia vicprezidanto atentigas nin, ke en
nia l. Bulteno 49 ni erare skribis, pro
manko de informoj, ke BKE estis la unua
landa organizaĵo, kiu post 5-jara agado
sukcesis aĉeti propran sidejon. Laŭ liaj
informoj KKE kiam fondita tuj aĉetis sian
sidejon. Ni korektas la eraron kaj pardon-
petas, gratulante al la bonŝanca KKE,
kiun, laŭ la informoj, helpis 176 personoj.

Kunlaboru ni! Unuiĝo estas forto!

ALIĜILO

Pere de banka ĉeko pagebla en Santos (SP), oni sendu la aliĝkotizon al Marija Pozder
Almada - laŭ la adreso: Rua Galeão Carvalho, 31-73, CEP 11.100 - Santos (SP).

KOTIZOJ

Ĝis la 31-a de decembro 1979:

Plenkreskuloj	Cr\$ 300,00
Akompanantoj (edzino)	Cr\$ 200,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 50,00

Post la 31-a de decembro 1979:

Plenkreskuloj	Cr\$ 400,00
Akompananto (edzino)	Cr\$ 300,00
Junulo (ĝis 25-jara)	Cr\$ 100,00

Aliĝanto:

Adreso:

Urbo: CPF: Ŝtato:

Akompananto:

Rimarko: Utiligu ĉi tiun parton de la Bulteno, ĝin sendante kune kun la ĉeko, poŝtman-
dato aŭ almaniere. La kvitancon de la sendita mono ni faros per bulteno, surlistigante la
nomojn de la enskribintoj.